

Ni ĉiuj

2/2008



***LA MEKSIKA AGADO DUM LA TUTAMERIKA, UNIVERSALA KAJ JUNULARA
KONGRESOJ EN 2008***

LA FORMIĜO DE NOVAJ ESPERANTAJ GRUPOJ EN MEKSIKO

***LA INSTRUADO – LERNADO DE LA LINGVO, FUNDAMENTA PUNKTO POR LA
BONO DE LA ESPERANTA MOVADO***

ALIAJ ESPERANTAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO EKDE MAJO 2008

NOVEMBRO 2008

Kara membro de MEF;

“**NI ĈIUJ**” estas la oficiala organo de Meksika Esperanto-Federacio, kiu ekde majo 2008 aperas regule ĉiun duonjaron. En tiu ĉi dokumento vi trovos kelkajn informojn pri lastaj internaciaj kongresoj okazintaj dum la somero 2008. Temas pri la 7^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en Montrealo, Kanado, la 93^a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Roterdamo, Nederlando kaj la 64^a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Szombathely, Hungario. Ni koncentriĝis ĉefe pri la aktiva partopreno de meksikaj geesperantistoj, tiel ke vi scios kion kaj kiel ni agas kiel meksikanoj kaj kiel Federacio por kontribui la sukceson kaj plibonigon de la esperanta movado.

Vi povos legi belegan poemon verkita de Ludwik Lejzer Zamenhof, ĝia nomo: “La Preĝo sub la verda standardo”, la Dro. Esperanto verkis kaj deklamis ĝin dum la 1^a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Boulogne sur Mer, Francio en aŭgusto de 1905. Ĝia enhavo esprimas tre bone la spiriton kaj bonon, kiujn celas ne nur la Universalaj Kongresoj sed ĉiuj internaciaj renkontiĝoj, en kiuj preskaŭ iu ajn limo inter la homoj malaperas. Ekde 1905, kaj ni esperas, ĝis la estingo de la homaro, ni, la geesperantistoj, okazigos tiajn eventojn kaj memoros la unuan universalan kongreson, kie Zamenhof komencigis tiun “emocian aventuron”

Ankaŭ vi trovos kelkajn novaĵojn pri esperantaj aranĝoj en Meksiko, kaj aliajn interesajn informojn. La estraro de Meksika Esperanto Federacio deziras al vi ĝui la dokumenton kaj samtempe volas memori vin ke ni ĝojus ricevi viajn komentojn kaj konstruajn kritikojn, tiel ke ni povu konstante plibonigi nian laboron.

Elkore,
Mallely Martínez Mateos
Nome de la MEF-estraro.

Preĝo sub la verda standardo¹

L. L. Zamenhof

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
fortego, la mondon reganta,
al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero
kaj fonto de vivo konstanta,
al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,
kun dogmoj de blinda fervoro:
silentas nun ĉiu disput' religia
kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,
kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
ni staras nun, filoj de l' tuta homaro
ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,
sed ĝi sin dividis batala;
popolo popolon atakas kruele,
frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,
aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,
redonu la pacon al la infanaro
de l' granda homaro!

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,
sed lasu nin venki la baron;
donacu Vi benon al nia laboro,
donacu Vi forton al nia fervoro,
ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos;
ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l' mondo nin benos,
kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
ekregos sur tero.

¹ La poemon ni prenis el la libro de William Auld, (1988); La fenomeno esperanto, eldonita de UEA en Nederlando, p. 114 -115.

TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO EN MONTREALO, KANADO

Verkita de David López R.

Tradukita al Eo de Daniel Moreno M.

De la 11a ĝis la 18a de julio 2008, Montrealo ricevis la 7an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto, kies temo estis **Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj** (bildo 1).

Tiun kongreson partoprenis kaj amerikanoj kaj eŭropanoj kaj azianoj (bildo 2), do Esperanto, kiel komunikilo, denove donis la ŝancon koni kaj kunvivi kun diverskulturaj homoj. Konferencoj, paroladoj, diskutoj, kursoj, ekzamenoj, promenadoj kaj ekskursoj estis eblaj en spertriĉiga kaj diverskultura atmosfero.

Meksikaj geesperantistoj aktive partoprenis tiujn eventojn, pliriĉigante la programon. Inter ili, Daniel Moreno prelegis pri „**Graveco de niaj lingvoj en mondo pli kaj pli ŝanĝiganta**“ (bildo 3) kie li esprimis ke lingvoj ne malaperas solaj sed kun kulturo kaj pensmaniero de homoj, kiuj parolas tiun lingvon. Krom tio li gvidis kurson por komencantoj kiun partoprenis kaj komencantoj kaj komencintoj.

Martin Schäffer prezentis antaŭ aŭtoritatoj de UEA, de Amerika Komisiono, kaj diversaj interesuloj la projekton „**Amerika Oficejo**“, kiu celas plibonigon kaj altkvaliton de esperanta movado en la tuta Ameriko, ĉefe en landoj kie la movo ankoraŭ ne estas forta, inter ili estas Meksiko.

David López prelegis pri sia perspektivo pri etna kaj lingvistika diverseco en San Luis Potosí, per la prezento „**Diverseco en la diverseco**“ (bildo 4), diskonigante parton de la granda meksika mozaiko.

Dum la „**Nokto Latina**“ fratinoj Mallely kaj Morayma Martínez montris sian talenton kaj guston al dancado prezentante du tradiciajn dancojn de Sinaloa, antaŭ publiko, kiu ĝuis diversecon de muziko kaj danco de Meksiko, Peruo, inter aliaj.

Oni ankaŭ devas mencii la prezenton de „**Tekilo Esperanto**“ (bildo 5), kiel esperanto estas konata kaj uzata internacie, tiel tiu ĉi entrepreno celas diskonigi internacie gravan trinkaĵon de Meksiko.

Tiamaniere TAKE 7 en Montrealo sukcesis kaj montris ke homoj povas kuniĝi en paca, amika, harmonia atmosfero malgraŭ sociaj, kulturaj, ekonomiaj, politikaj aŭ religiaj diferencoj. Tio estas la rezulto de la baza fundamento de esperanto, komunika ponto, kiu havas profundan socian senson.

Amerikaj geesperantistoj invitas vin al venonta TAKE en 2011 en unu el la plej gravaj landoj en la esperanta movado. Ni vidu unu al la alian en Brazilo!

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



Bildo 1. La 7^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto.
Foto: Morayma Martínez.



Bildo 2. La partoprenintoj de la 7^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto.
Foto: Milan Sveda el Kanado.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



Bildo 3. Prelego de Daniel Moreno pri **“Graveco de niaj lingvoj en mondo pli kaj pli ŝanĝiganta”** dum la 7^a TAKE. Foto: Morayma Martínez.



Bildo 4. Prelego de David López pri **“San Luis Potosí: diverseco ene ja diverseco”** dum la 7^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. Foto: Mallely Martínez.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



Bildo 5. Martin Schaeffer prezentante “**Tequila Esperanto**” dum la **7a TAKE**.
Foto: Mallely Martínez.

EKZISTAS JAM KVAR ESPERANTAJ GRUPOJ EN MEKSIKO*

Jam antaŭ jaroj ekzistas en Meksiko grava esperanta grupo, kiu komenciĝis pro la entuziasmo de junulo, kiu devis lerni esperanton en la mezlernejo.

La internacia lingvo estis parto de la studplano en lernejo de Oaxaca, sed por Leandro García ne nur estis iu ajn kurso. Pro tio, eksterlerneje li instruis aliajn homojn kaj post iom da tempo li formis esperantan grupon en tiu urbo.

Antaŭ kelkaj jaroj Leandro translokiĝis al Tabasco, sudorienta ŝtato de Meksiko, sed li lasis la semon en Oaxaca kaj ĝis nun malnovaj kaj novaj geesperantistoj renkontas sin kaj aktive tenas tiun gravan grupon de la lando.

Nuntempe ekzistas en Meksiko kvar esperantaj grupoj. Dum tiu ĉi jaro, danke al la

entuziasmo kaj laboro de aktivaj geesperantistoj, formiĝis tri grupoj en gravaj urboj. Temas pri la grupoj de Meksikurbo, de Guadalajara, kiu estas en la centra-okcidenta parto de la lando, en la ŝtato de Jalisco kaj de la grupo en Monterrey, kiu troviĝas en la ŝtato de Nuevo León, norde de Meksiko.

Je ĉiu flanko la grupoj celas stimuli pli da homoj lernadi kaj praktiki esperanton, renkonti sin regule kaj tiel kreskigi la movadon.

Gratulon kaj bonŝancon al la iniciatoj kaj grupanoj de Oaxaca, Meksikurbo, Guadalajara kaj Monterrey!

* Verkita de Mallely Martínez kun informoj de Gabriela Reyes el Oaxaca, Sara González el Guadalajara kaj Denice Maldonado el Monterrey.

93^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, ROTERDAMO

Mallely Martínez

Kun la temo “**Lingvoj, trezoro de la homaro**”, la pasinta 26an de julio, finiĝis la 93an Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdamo, Nederlando, feriante la 100 jara-jubileon de la kreado de la Universala Esperanto Asocio.

Partoprenis pli ol 1800 personoj el 73 landoj (bildo 6). Speciala estis la ĉeesto de esperantistoj alvenantaj el Algerio, Armenio, Benino, Togolando, Madagaskaro, Indonezio, Salvadoro kaj Venezuelo, malofta situacio dum la historio de Universalaj Kongresoj, kiuj okazas jam ekde pli ol jarcento.

Kiel kutime la enhavo de la programo estis vasta kaj interesa, kun pluraj temoj kaj aktivecoj por junuloj kaj plenkreskuloj. Oni komencis kun la “**Movada Foiro**” en kiu dekoj da organizoj prezentis finajn laborojn kiuj estis faritaj dum monatoj aŭ eĉ jaroj, ankaŭ oni montris projektojn, planojn, vendotajn produktojn, ktp., kompreneble ĉio rilate al la esperanta movado.

Membroj de la Meksika Esperanto Federacio prizorgis la budon de “**La Amerika Komisiono**” (Bildo 7), tie oni informis iomete pri la laboro en Ameriko sed pli grave estis inviti la ĉeestantojn al la renkontiĝo je la venonta tago pri “**Amerika Agado**”, kiun gvidis Maritza Gutiérrez, Atilio Orellana kaj Martin Schaeffer. En la sama stando ni inkludis informon pri la agoj de Meksika Esperanto Federacio, ekzemple, ni reklamis la libron “Tra la okuloj de la venkitoj”, gravega verko pri nia historio dum la epoko de la konkero, ankaŭ ni informis pri nia venonta nacia kongreso, kiu okazos en la Nacia Universitato (UNAM) en junio 2009.

Rilate al la lernado kaj pliboniĝo de la lingvo, oni organizis kursojn por komencantoj kaj progresantoj, krome okazis la seminario “Cseh metodo” por instruistoj de Esperanto. Kaj kiel forgesi mencii la jam tradician **oratoran konkurson**, kiun povas partopreni nur junuloj malpli aĝaj ol 30, ĉifoje la geesperantistoj povis elekti unu el la sekvantaj temoj;

- 1) Ĉu oni devas kontraŭbatali la malaperon de lingvoj?
- 2) Kiuj estas la novaj defioj por la centjare juna UEA?
- 3) Ĉu povas harmonie kunvivi malsamaj kulturoj?

Daniel Moreno, meksika junulo kaj estrarano de Meksika Esperanto Federacio, gajnis la konkurson kun la unua menciita temo (bildo 8). Ni kore gratulas lin kaj tre ĝojas pro tiu grava sukceso.

Ne mankis la renkontiĝoj de esperantistoj, kiuj havas specifajn kaj komunajn interesojn kaj kiuj laboras por inkludi tiajn temojn en la esperanta mondo, ekzemple, la kunvenoj por muzikistoj, blinduloj, advokatoj, ĵurnalistoj, kuracistoj, sciencistoj, verkistoj, ktp. Aliflanke la

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★

kongresanoj povis viziti aliajn interesajn prelegojn, resumon de kelkaj vi povas trovi je la sekva ligo <http://www.uea.org/dokumentoj/IKU/prelegoj2008.html>

Rilate al la **artaj aktivecoj**, la kongresanoj povis ĝui la prezentadojn de artistoj kiuj ne parolas Esperanton sed ankaŭ de tiuj talentaj personoj kiuj, krome, estas esperantistoj. Partoprenis “JoMo” (bildo 9) kaj “Jomart kaj Nataŝa” (bildo 10) inter la plej konataj en la esperanta mondo.

Unu tago antaŭ la fermo de la kongreso okazis la “**internacia vespero**”, en kiu partoprenis geesperantistoj el pluraj partoj de la mondo, ili montris al ni iom de sia propra kulturo. Entute estis 25 prezentadoj, inter ili okazis deklamado, kantoj, dancoj, tri korusoj, unu el ili internacia kiu formis sin dum la kongreso. Komprenoble ne mankis la partopreno de la “**meksika folkloro**”; Mallely, Morayma kaj Nelly dancis tiel, kiel “oni dancas en Meksiko”. Ili prezentis du tradiciajn dancojn de la ŝtato de Sinaloa (bildo 11); “La saliko kaj la palmo” kaj “Flugu kolombo”, la organizanto de la “Internacia Vespero” kaj la spektantoj ŝategis tiun preskaŭ lastan prezentadon kaj multe gratulis la meksikaninojn pro ilia partopreno.

Aliflanke oni diris bonan novaĵon por kelkaj, ne tiel bona por aliaj... dum la fermo de la kongreso oni anoncis ke la **95a Universala Kongreso de Esperanto en 2010** estos en La **Havano, Kubo**. Speciale la loĝantoj de la Amerika Kontinento sentas sin kontentaj ĉar oni supozas ke, pro la proksimeco, ne nur kanadanoj kaj usonanoj, sed ankaŭ meksikanoj kaj aliaj latinoamerikanoj havos pli grandan eblecon partopreni. Ni profitos la okazon! Nian tutan subtenon kaj apogon al la Kuba Esperanto Asocio. Sukceson!




Bildo 6. **Partoprenintoj** de la 93^a Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo.
Foto: Mallely Martínez

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



Bildo 7. Morayma Martínez prizorgante la budon de Amerika Komisiono dum la “**Movada Foiro**” la 19an de julio 2008. La MEF profitis tie montri produktojn kaj verkojn de Meksiko.

Foto: Mallely Martínez.



Bildo 8. Daniel Moreno post la ricevo de du libroj kiel premio pro la gajno de la “**Oratora Konkurso**” okazinta la 24an de julio dum 93^a UK. Foto: Emmi Breuningel el Germanio.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



Bildo 9. Koncerto de **JoMo** en la trinkejo “La Blanka Elefanto” la 21an de julio en la urbo Rotterdam dum la 93a UK. Foto: Mallely Martínez.



Bildo 10. Koncerto de **Ĵomart kaj Nataŝa** la 22an de julio dum la 93a UK.
Foto: Mallely Martínez.



Bildo 11. (De maldekstre al dekstre) Morayma, Mallely kaj Nelly Martínez Mateos post sia partopreno en la “**Internacia Arta Vespere**” la 25an de julio 2008 dum la 93^a UK.

Foto prenita el vikipedio http://eo.wikipedia.org/wiki/UK_2008

LA INSTRUADO – LERNADO DE LA LINGVO, FUNDAMENTA PUNKTO POR LA BONO DE LA ESPERANTA MOVADO

Mallely Martínez

“Praktiki kaj uzi Esperanton”, tiuj estas du el la ĉefaj celoj en la Esperanta movado, sed kiel atingi ilin? Unue estas grava lerni la lingvon, tutklare estas malsamaj manieroj akiri la gramatikajn, fonetikajn, sintaksajn konojn, povas esti per diversaj metodoj, per la reto, kun virtuala, ĉeestanta aŭ eĉ sen instruisto.

“Malgraŭ la relativa facileco de la lingvo, mi ne povas lerni sola, nek per interreta kurso, nek per lernolibro, mi bezonas helpon” tion diris jam kelkaj homoj, kiuj petis al mi instrui ilin, sed la malproksimeco inter niaj loĝlokoj ne permesas al ni realigi tion tradicie, tio estas, en lernejo kun instruisto kaj gelernantoj. Nur restas al ni uzi la fantastikan teknologion; la interreton.

La rezulto ĝis nun estas bona, sed ni devas konscii ke estas homoj, kiuj lernis ion ajn

tradicie, ekzemple kelkaj plenkreskuloj, kiuj eĉ timas troviĝi ĉe komputilo. Pro tio estas grava la laboro de samideanoj tra la mondo kiuj havas la eblon instrui Esperanton ie ajn, en domoj, lernejoj, universitatoj, ktp.; tiel la interesuloj lernas la lingvon aŭdante, parolante ĝin, konante aliajn persone, kun grava instruhelpo.

En Meksiko ni havas la ŝancon lerni tiele en la Nacia Universitato (UNAM), la esperantaj kursoj tie ekde 2003 seninterompe sukcese okazas danke al la persista kaj bona laboro de Luis Córdova, Hugo González kaj Daniel Moreno. Resumante; “la instruado kaj lernado” kia bona solvo ne nur por praktiki kaj uzi la lingvon sed por igi ke aliaj praktiku kaj uzu Esperanton por la bono de la movado.

64^a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO, SZOMBATHELY

Morayma Martínez

Inter la 26^a de julio kaj la 2^a de aŭgusto 2008 okazis la Internacia Junulara Kongreso en Szombathely, Hungario. Junaj geesperantistoj alvenis al tiu ĉi urbo antaŭ tagmezo, aliaj dum la vespero post sia partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, Nederlando.

Partoprenis la IJK-on pli ol 350 homoj el 36 landoj, inter la tri kun pli da partoprenantoj estis Hungario, Rusio kaj Germanio, aliflanke Finnlando, Israelo, Koreio, Pakistano kaj Togolando estis la landoj kun malpli da kongresanoj, tamen ilia partopreno estis tiel grava kiel la de ĉiuj.

Estis du meksikanoj, kiuj ricevis subtenon de la estarantoj de TEJO, ni dankas ilin pro tiu helpo. Niaj samlandanoj partoprenis aktive en la laboro, kiu kontribuis sukcesigi la eventon.

La aktivecoj de la IJK komencis sabate per la akcepto kaj la **interkona vespero**, tamen la solena inaŭguro estis dimanĉe matene antaŭ la urbodomo de Szombathely. La prezidantino de la organiza komitato, Veronika Acsádi, kaj vicprezidanto de la urbo bonvenigis la junularan komunumon, poste la prezidanto de TEJO, Gregor Hinker, ankaŭ diris varmajn vortojn al la ĉeestantoj.

Reprezentantoj el ĉiuj landoj portis balonon sur kiu oni indikis la nomon de la lando (bildo 12), speciale estis la momento kiam ili salutis en sia gepatra lingvo la ĉeestantojn kaj la ĵurnalistojn. Daniel Moreno reprezentis Meksikon kaj en la hispana diris: “Saludos Szombathely...”

Por daŭrigi la programitajn aktivecojn oni organizis **lud-konkurson**. La celo estis favori la interkonatiĝon inter junuloj kaj samtempe, koni gravajn lokojn de la urbo. La tasko estis fari teamojn kaj respondi demandojn pri muzeoj, arkitekturo, statuoj, parkoj, ktp., logike estis lima tempo por malkovri la enigmojn. Gajnis tiu teamo, kiu uzis malpli da tempo kaj solvis korekte la demandojn. Interesa estis ke malgraŭ la varma temperaturo, je 30°C, la gejunuloj kuris ĉiuloken kun mapo kiel helpo. Bonŝance por la teamoj en kiuj almenaŭ unu persono estis hungaran(in)o, kiel scii la esperantan nomon de ekspozicio, se ĉiu afiŝo estis en la hungara? Kiel estas pli facila trovi straton? Demandante pri ĝi al la loĝantoj, ĉu? Ĉiel estis bona kaj interesa ludsperto!

Dum la semajno estis aliaj **interesaj kaj amuzaj aktivecoj**, inter ili estis sciencaj konferencoj, signifaj gestoj en malsamaj kulturoj kaj landoj, kaj tiu nomata “**Aktivula trejnado**” grava temo por personoj, kiuj aktivas en la esperanta mondo.

Morayma Martínez, Daniel Moreno kaj Martin Schaeffer partoprenis ĝin por akiri konojn kaj reklami pli bone Esperanton, ekz. scii kiel organizi sukcese renkontiĝojn, kongresojn, artajn kaj kulturajn aktivecojn kaj, kial ne? aktivecojn nur por amuziĝi.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★

Ekzistis pluraj temoj, kiuj gvidis parton de la programo dum specifaj tagoj, ekz., dum la **“tago de la danco”** vizitis la kongresejon profesiaj personoj, kiuj instruis al la gejunuloj diversajn dancojn: de “rock and roll” ĝis la ekzota “ventro-danco”. La tago finiĝis per prezentado de la dancinstruistoj kaj sia teamo en la universitata teatro (bildo 13).

Dum la **“tago de la sporto”** estis akvaj kaj sportaj aktivecoj, eĉ konkursoj kun amikeca etoso; de piedpilko ĝis la konkurso “kiu manĝas la akvomelonon plej rapide?”. Vespere estis prezentado pri Aikido, Karate kaj Kick Boxing.

Dum la tago nomata **“Kultura Festivalo”** ĉiu grupo de geesperantistoj, inter ili meksikanoj (bildo 14), montris ion pri sia lando; kanto, danco, muziko, ktp. La programgvidantoj estis Veronika Acsádi kaj la konata esperantisto kaj kantisto JoMo. Menciinda estas ke tiu festivalo estis malfermita ankaŭ por la loĝantaro de Szombathely, tiel oni montris la kulturecon kaj la internacian amikecon kiu ekzistas en la esperanta mondo. Por tiuj loĝantoj, kiuj ne sukcesis ĉeesti la kulturecon festivalon, aperis kelkaj artikoloj kun belaj bildoj, do... ili ankaŭ informiĝis pri esperanto kaj la movado.

Inter aliaj okazaĵoj... kiel forgesi la grandan kukon, la etoson kaj la amuziĝon, kiuj akompanis la feston de la **70a datreveno de TEJO?** (bildo 15) La diskotekajn vesperojn kaj la ekskursojn?

La semajno finiĝis per **akvobatalo** kontraŭ la fajrobrigadistoj de la regiono; la geesperantistoj batalis, ankaŭ inter ili mem (bildo 16), per plastoboteloj, balonoj kaj akvopafiloj plenaj da akvo. Post la granda batalo, kaj kompreneble la malsekiĝo, la gejunuloj denove vizitis la urbnagejon por festi la produĵon. La aktivecoj finiĝis per la internacia vespero kaj la fermo de la kongreso, tiam oni spiris melankolian etoson, sed ankaŭ esera... esperante renkontiĝi denove la venontan jaron en **Liberec, Ĉeĥa Respubliko**, kie estos la **65° Internacia Junulara Kongreso**.



Bildo 12. Dum **“La Solena Malfermo”** de la 64^a Internacia Junulara Kongreso, la 27an de julio 2008.
Foto: Mallely Martínez.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



Bildo 13. Prezento de la nomata “**Ventro-danco**”. Foto: Mallely Martínez.



Bildo 14. (De maldekstre al dekstre) Morayma, Mallely kaj Nelly Martínez Mateos post sia partopreno en la “**Kultura Festivalo**” la dum la 64^a IJK. Foto: Ivo Miesen el Nederlando.

★ **MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO** ★



Bildo 15. “La grandaj kukoj” de la 70^a datreveno de TEJO. Foto: Damir Malkoĉ el Kroatio.



Bildo 16. La “Akrobatalo” inter la partoprenantoj de la 64^a Internacia Junulara Kongreso en Szombathely, Hungario. Foto: Ikuko Kitagawa el Japanio.

ALIAJ ESPERANTAJ AKTIVECOJ EN MEKSIKO EKDE MAJO 2008

DISDONADO DE FLUGFOLIOJ

Oni disdonis centojn da flugfolioj por informi pri la lernado kaj uzo de la internacia lingvo Esperanto en pluraj urboj de Meksiko. Geesperantistoj el Guadalajara, Meksikurbo, Monterrey, Morelos, Oaxaca, San Luís Potosí kaj Ŝtato de Meksiko petis al la MEF sendi la informilojn por varbi Esperanton en siaj loĝlokoj. Certe la bona rezulto de tiu ago venos baldaŭ.

EN GAZETO

La sekva artikolo estis publikita, hispane, en la loka gazeto “Artículo 7, N-ro 26” de la urbo Mérida, kiu troviĝas en la ŝtato Yucatán en la sudoriento de la lando. Franz Fortuny, kiu esperantiĝis en 2007, sukcesis aperigi en ĉiu numero de la gazeto A7 artikolon rilate al Esperanto. “Artículo 7” aperis unuafoje la 7an de junio 2008 en eldonkvanto de 15,000 ekzempleroj kaj estas bonega ilo por sciigi la homojn pri la Internacia Lingvo ne nur de Mérida sed de diversaj partoj de la lando ĉar ankaŭ oni povas trovi ĝin en la reto <http://a7.com.mx/publicaciones-A7-1.html> . En “NI ĈIUJ” ne aperas la kompleta artikolo, nur la plej gravaj informoj por la jam esperantoparolantoj. La tradukon de la hispana al Esperanto faris Mallely Martínez.

ESPERANTISTINOJ EL GERMANIO KAJ BULGARIO VIZITIS MAJAAN ZONON

Franz J Fortuny Loret de Mola

La afabla vizito de Esperanto-turistoj, ornamis per sia prezenco la oficejojn de “Artículo 7” (bildo 17). Ili estas Christiane Altrogge el Berlino, Germanio kaj Daniela Power, kiu devenas el Bulgario kaj edziniĝis kun la usonano Charles Power, kiun ŝi konis dum Universala Kongreso de Esperanto.

Dum pli ol du horoj la direktoro de “Artículo 7”, Franz Fortuny, kaj la esperantistinoj parolis la tutan tempon Esperante, kun granda ĝojo ili pruvis denove la realan funkcion de la Internacia Lingvo, kreita de Dro. Lázaro Zamenhof antaŭ pli ol 120 jaroj.

Ni, la esperantoparolantoj, nur havas unu limon kiam ni interparolas; la apliko de la 16 reguloj de tiu ĉi bela, praktika, facila kaj potenca komunikilo. Ĉiu el ni, kun malsamaj naciaj lingvoj: germana, bulgara kaj hispana, aplikis la regulojn kaj uzis tipajn kunmetitajn vortojn de la Esperanta lingvo.

La vizitintoj ĝoje donacis al la loka esperantisto la romanon “La bato”, esperanta verko de la rusa Lena Karpunina. La libro estis eldonita en Moskvo kaj celas esti konata de miloj da geesperantistoj el landoj kiel ekzemple Pollando, Finnlando, Danio, Svedio, Norvegio, Latvio, Estonio. Litovio,

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★

Slovakio, Ĉeĥio, Hungario, Rumanio, Germanio, Ukrainio, La Balkana duoninsulo, interaliaj.

La Esperanta aŭtorino profitas la okazon por komuniki, sen lingvaj kaj kulturaj limoj ke, se ŝi estus skribinta sian verkon en sia nacia

lingvo, la rusa, ŝi nur povus havi la interpreton de unu sola kulturo.

Ĉiuj spertoj kun Esperanto pravas la stultecon de la homaro, kiu neas akcepti solvojn, kiam tiuj estas malproksimetaĵoj de siaj pensmanieroj, de la normalaĵo.



Bildo 17. (De maldekstre al dekstre) Christiane Altrogge, Franz Fortuny kaj Daniela Power en la oficejoj de "Artículo 7", Mérida Yucatán.

EN RADIO

En "Radio Tecnológico 98.8 FM" el Tijuana, Baja California estis kelkaj elsendoj kun intervjuoj pri Esperanto, kiuj lokaj reporteraj faris al Martha Cárdenas kaj Gilda Muñoz. La mefano Jesús Cuevas Pelayo faris la kontakton inter ili kaj daŭre apogas kaj instigas al Gilda kaj al Martha sekvi kun la varbado en Tijuana per la radio.

La laboristoj de la radio kaj la aŭdantaro el tiu urbo ŝatis tiom multe la donitajn informojn de la esperantistinoj ke estas projekto havi semajnan programon pri Esperanto. Dum realiĝas tiu bonega plano, Gilda Muñoz registris etajn radiokapsulojn, tiel ke oni povas dissendi ilin dum la tago ene de la normalaj programoj de "Radio Tecnológico". La 14an de decembro estos la venonta kunlaboro inter "Radio Tecnológico" kaj Esperanto, Gilda iros al la radio por esti intervjuita denove, ŝi profitos la okazon paroli pri la "Internacia Lingvo" kaj la "Zamenhofa Tago"


INSTRUADO

Danke al la motiveco kaj instigo de la juna esperantisto Víctor Sombra kaj la apogo de Martin Schaeffer kaj la MEF-estraro, estas plano komenci instrui Esperanton en januaro 2009 en la Universitato de Chapingo. Mankas nur la fina informo de la universitatestroj pri la justa loko kaj la datoj.

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★

	ALIĜILO
Meksika Esperanto-Federacio	<p><input type="checkbox"/> Jes! mi volas aliĝi al la Meksika Esperanto-Federacio kaj subteni la uzon kaj / aŭ la disvastigon de la internacia, neŭtrala, justa kaj facile lernebla lingvo, Esperanto en Meksiko! La individua membreco por 2009 kostas 200 Meksikaj pesoj jare (de la 1^a de januaro ĝis la 31^a de decembro).</p> <p>La kotizon mi povas transdoni persone aŭ deponi al la konto de MEF: HSBC, 6284087436 je la nomo de Morayma Martínez Mateos, (post la depono, bv. sendi la konfirmilon / skanon per la reto al: morayma_mm@hotmail.com)</p> <p>Pro via apogo, ni elkore dankas vin! La estraro de MEF</p>
Persona Nomo:	Familia Nomo:
Adreso:	Poŝtkodo:
Lando:	Ĉu tiu strat-adreso ĝenerale funkcias? Jes: () Ne: () Se ne, ĉu vi havas alian, ekzemple poŝtkatolo? Skribu ĝin sube:
Naskiĝdato: Tago ____ Monato ____ Jaro ____	Esperantist(in)o ekde:
Retadreso:	Telefono: <input type="checkbox"/> Hejma <input type="checkbox"/> Laboro (____) ____ - ____ Poŝtelefono: (____) ____ - ____
Profesio:	Ĉu vi estas membro de UEA-membro? <input type="checkbox"/> Jes, mia kont-numero estas: ____ <input type="checkbox"/> Mi ne estas membro <input type="checkbox"/> Mi ŝatus aliĝi al UEA nun, bonvolu doni al mi pli da informo.
Aliaj informoj:	Pag-metodo: <input type="checkbox"/> Ĉeko <input type="checkbox"/> Kontanta mono <input type="checkbox"/> Bank-depono <input type="checkbox"/> Kredit-karto \$ ____
Mi povas subteni Esperanton / Mi proponas:	
Dato: Tago ____ Monato ____ Jaro ____ Subskribo:	
Por pagi per kreditkarto: <input type="checkbox"/> Visa <input type="checkbox"/> Mastercard Numero: ____ - ____ - ____ - ____ Limdato: Monato ____ Jaro ____ . Nomo sur la karto: _____ Subskribo de la kart-posedanto: _____ Tago ____ Monato ____ Jaro ____ .	

★ MEKSIKA ESPERANTO FEDERACIO ★



“Tra l’ okuloj de l’ venkitoj” estas eldono de Meksika Esperanto Federacio, en kiu oni trovas la historion de la meksika konkero sed je la vidpunkto de la venkitoj. La aŭtoro de la verko, Dro. Miguel León Portilla, mencias ke ĝi montras la sentojn de la indiĝenoj, kiuj rezultis de la violenta renkonto kun la hispanoj. La celo de lia libro estas sciigi la homojn, kiu estas la perspektivo de la indiĝenoj: la atesto de tio, kion vivis, pensis kaj sentis la venkitoj.

La Dro. Miguel León Portilla estas historiisto, lingvisto, antropologo, etnologo kaj filozofo, meksikano kiu studis senlace la naŭatlan lingvon kaj ĝian filozofion. En 1957 estis la unua eldono de tiu ĉi verko en la hispana kaj ĝi estis tradukita al pluraj lingvoj, inter ili la angla, germana, rusa, itala, franca, pola, hungara, sveda, hebrea, portugala, japana, Esperanta, inter aliaj.


La Esperanta eldono aperis en 2001 danke al la afabla permeso de la aŭtoro, al la traduko de Dro. Juan Jacobo Schmitter Soto kaj al la bildoj de sro. Alberto Beltrán.

Ne nur la meksikaj esperantistoj devas havi tiun ĉi verkon, sed ankaŭ tiuj, kiuj interesiĝas pri Meksiko kaj ĝia historio. Se vi ankoraŭ ne havas tiun ĉi verkon, faru vian mendon al la Meksika Esperanto Federacio. La prezo estas nur \$80.00 (okdek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.

Eldonita de UEA, **Vojaĝo en Esperanto-lando** estas fama kurso por progresantoj kaj transportilo al la esperanta kulturo. Tiu bonega verko de Boris Kolker enhavas multajn diversajn temojn, inter ili; gravaj esperantistoj, la esperanta historio, kulturo, literaturo, ktp. “Vojaĝo en Esperanto-lando” ne estas normala lernolibro.

Tiu ĉi estas la tria eldono, kiu aperis en 2005, la unua aperis en 1992 kaj la dua, reviziita kaj renovigita, en 2002.

Vidu la sekvan ligon <http://www.lingviko.net/vrec.htm> kaj tiam vi scios, kial tiu ĉi libro devas esti en via persona biblioteko. Vi povas trovi ĝin en la libro servo de MEF. La prezo estas \$310.00 (tricent dek meksikaj pesoj) plus sendokostoj.



“Tequilera Esperanto” naskiĝis en 2003 kun la celo krei markon, kiu garantias al la konsumantoj la plej bonan kvaliton de unika Tekilo en sia klaso. Ni estas orgojlaj oferti al vi 100% meksikan produkton kiu enboteliĝis en nekomparebla stiloplena botelo.

La ideo elekti la markon “Esperanto” kreiĝis kun la celo ke ĝi, kiel la Internacia Lingvo, estu konata en la tuta mondo.

“**Tequila Esperanto**” estas tiel bona ke en la jaro 2007, ĝi gajnis la premion “Distilita trinkaĵo de la jaro” en Germanio. Meksika Esperanto Federacio havas por vi “Tequila Esperanto” kun 750 ml kaj ripozo de 24 monatoj, la prezo estas \$680.00 (sescent okdek pesoj) plus sendokostoj.